

# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

## **Bertha von Suttner, la unua ina nobelpremiito pri paco**

**Prelegos:** Petr Chrdle

Bertha von Suttner (1843–1914), naskiĝis en Prago (tiam Aŭstria Imperio) kiel grafino Bertha Sophia Felicita Kinsky. Tridekjara ŝi edziniĝis kun Arthur von Suttner. En la jaro 1905 ŝi kiel la unua virino ricevis la Nobel-premion pri paco. Tutmonde ŝin famigis ŝia majstroverko [For la batalilojn!](#). Lian vivon kaj aktivadojn, inkluzive de tiuj literaturaj, priskribis P. Chrdle en la verko [Sen laco popr paco: Vivo kaj verko de Bertha von Suttner](#).

Apud la porpacaj aktivadoj ŝi engaĝiĝis kontraŭ la tiama forta antisemitismo kaj okupiĝis ankaŭ pri virina emancipiĝo.

**Lingvo:** Esperanto

**Kiam:** la 11-an de Majo 2021 je la 18-a h.

**Kie:** La renkontiĝo okazos rete per programo Skype (Skajpo). Se vi ankoraŭ ne havas ĝin, mi petas vin instali ĝin. Oni povas elŝuti la programon el retejo <https://www.skype.com/cs/get-skype/>. Vi povas uzi ĝin per komputilo, tabletkomputilo kaj saĝpoŝtelefono (Android kaj iPhone). La sistemo funkcias ankaŭ per retumilo (Edge kaj Chrome), sed ni rekomendas uzi programon.

Ni rekomendas, ke vi uzu aŭskutilojn kun mikrofono por preventi eĥon. Sed ne estas bezonata, vi povas uzi mikrofonon en via portebla komputilo (notebook).

Mi sendos ligilon por la renkontiĝo per retpoŝto marde.

Ĉar la renkontiĝo okazos rete, povas veni ankaŭ eksterlandaj esperantistoj. Ni vidos.



## **Ni rekomendas**

**Lasta ebleco por universitata formado de instruistoj en AMU!**

La Adam Mickiewicz Universitato (AMU) en Poznano, unu el la plej signifaj polaj universitatoj, ofertas tri-jaran eksteran postdiploman studadon pri interlingvistiko kaj esperantologio, kun specialigxo en la tria jaro i.a. pri instruado de Esperanto. [La instruista specialigxo realigxas kun la kunlaboro de Edukado.net k ILEI](#). La studado okazos plejparte virtuale.

Partoprenontoj el la tuta mondo povas aliĝi ĝis la 1-a de aŭgusto. Pli frua aligxo bonvena.

Legu pli ĉe la paĝo: <https://edukado.net/novajhoj?id=849>



## **Programo en Majo 2021**

La 18-an **Esperantská literatura** – Miroslav Malovec (ĉesky)

La 25-an *Ankoraŭ ne agordita*



## **120-a datreveno de fondo de nia klubo**

Esperantista klubo Brno kiel “První spolek esperantistů rakouských” (La unua asocio de esperantistoj aŭstraj) estis fondita en la jaro 1901. Ni festos nian jubileon la **18-an de Septembro 2021 en Brno**. Ni kore invitas vin. La programo ankoraŭ ne estas agordita.



Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (<https://www.esperantobrna.cz/index.php/eo/aprogramo>),
- na naší stránce na Facebooku (<https://www.facebook.com/esperantobrna/>)
- a na Eventa servo ([https://eventaservo.org/o/EO\\_Brna](https://eventaservo.org/o/EO_Brna))

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem [kanálu na Youtube](https://www.youtube.com/channel/UCQLClocHDdrb9TaHggRM5cA) (<https://www.youtube.com/channel/UCQLClocHDdrb9TaHggRM5cA>).

Milan Kolka  
prezidanto